ESPERANTO

MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 3

Marto 2016 Kol.371/32

xxxx

Karlštejn ("Karlův Týn") apud Prago – li postlasis kolekton de valoraj pentraĵoj de Majstro Theodoriko kaj sanktajn relikvojn. Al lia diplomatia lerteco dankis la lando pro jardekoj de paca vivo sen militoj.

Super lia ĉerko oni unuafoje nomis lin "Patro de la patrujo" kaj tiel la ĉeĥa nacio estimas lin ĝis nun, kvankam nur laŭ la patrino li estis de ĉeĥa deveno. La sango, heredita de la heroa patro, Johano de Luksemburgio, kunligis en lia persono tiun nacion kun la cetera Eŭropo.

Pri lia vivo estis verkitaj multe, tamen sian unuan biografion aŭtoris li mem, kaj la verketo apartenas al la plej gravaj latinlingvaj literaturaĵoj kreitaj en la mezepoka Ĉeĥio. Li celis instrui siajn sekvontojn sur la trono pri la politiko kaj pri la arto de saĝa regado. Legante ne forgesu, ke ĝin verkis homo ne nur ege potenca, sed ankaŭ tre pia kaj profunde kredanta, kiu sian surteran vivon opiniis nur preparo por la vivo eterna.

Lia aŭtobiografio komenciĝas fakte en la 3-a ĉapitro, ĉar la unuajn du li dediĉas al piaj meditoj, kiujn li daŭrigas en la ĉapitroj 11-a, 12-a kaj 13-a. Poste iras plu la historia rakontado, sed la ĉapitrojn 15-20 ne verkis Karolo mem. Pri sia naskiĝo li parolas kiel pri naskiĝo de Venceslao, ĉar tiel li estis baptita, kaj nur en Francio li akceptis la nomon Karolo laŭ sia onklo, la reĝo Karolo la 4-a, la Ĉarma.

La propran biografion de Karolo la 4-a esperantigis Josef Vondroušek. **Biografiaj informoj** **estas detale priskribitaj en Vikipedio sur 5 plenaj paĝoj, do interesatoj legu detalojn tie.**

https://eo.wikipedia.org/wiki/Karolo-la_4-a_Sankta_Romia_Imperiestro__

Kurso en Tajlanda Universitato 1

kun disdono de diplomoj. Okazis la unua Esperanto-kurso en Tajlando, kiun Warut Bunprasert preparis per la tajlingva Esperanto-lernolibro de Stano Marĉek. *En la PDF aperas foto de la kursanoj tenantaj la kurslib-*

ron. Raportas d-ro Gabor Markus: „Nia Esperanto-kurso en la Srinakharinwirot Universitato estis sukcesa. Warut ricevis supermezgradan atestilon, kiu per ĝi celas sukcesan profesian karieron pere de Esperanto. La dua studento ricevis atestilon pri la sukcesa fino de la enkonduka Esperanto-kurso, ĉar ŝi bone faris ĉiujn hejmtaskojn. Aliaj studentoj komencis fari la hejmtaskojn tre sukcese, do ankaŭ ili ricevos la unuan atestilon dum la venontaj semajnoj."

Mi uzas la libron de Stano Marĉek kaj samtempe ankaŭ miajn librojn (ekzercarojn), kiujn mi jam sukcese uzis en koreaj universitatoj kaj kiujn vi trovas jene: **http://esperantofre.com/mondo/mglegu.htm** „La studentoj en la universitato ne emas studi studobjektojn, se ili ne vidas, ke tio estas utila por ili. Ili bezonas diplomojn, aŭ atestilojn." Tiuj estis rapide kreitaj, en kunlaboro kun UEA. Kun la atestiloj estis aldonita dokumento kun la rezolucio de Unesko el 1954. D-ro Markus denove: „Se tiu projekto estos sukcesa, restos ŝanco, ke mi gvidu similan kurson en Laoso. Estro de anglalingva lernejo en Vientiane jam proponis tion al mi." Stefan MacGill.

Poludnica 2016

Dum la tagoj 6. - 10. 1. 2016 mi partoprenis jam la 34-an turisman renkontiĝon Poludnica, kiu okazis en Závažná Poruba (Slovakio). Krom la tradicia ascendo al la monto kaj konstruado de E-obo okazis multaj interesaj prelegoj. Plimulto el ili rilatis al turismado. Kadre de la renkontiĝo okazis AMO-seminario (Aktivula Maturigo) sperte gvidata de Jano Vajs kaj Stefano MacGill. Per la ĉeftemo – turismado estis ĉi tiu seminario dediĉita al la memoro de Andreo Grzebowski, fondinto de la turisma agentejo Esperantotur.
De Jano Vajs ni eksciis, kia estas la diferenco inter vojaĝoj organizitaj de vojaĝagentejoj kaj de esperantistoj. Dorotka Rodzianko instruis nin, kiel vojaĝi malmultekoste. Per skajpo partoprenis ankaŭ Petro Chrdle, kiu parolis pri siaj spertoj el organizado de turismaj aranĝoj.
Sekvis vojaĝpriskriboj de grimpadoj al 3 gravaj montoj: Carrauntuohil (Irlando), Ben Nevis (Britio) kaj Triglav (Slovenio). La grimpa-

doj estas parto de longtempa plano viziti ĉiujn plej altajn montopintojn en la landoj de Eŭropa Unio.
La partoprenantoj de la renkontiĝo estis solene akceptitaj de la vilaĝestro, ĉe kiu ili skribis en la memorlibron de la vilaĝo. Plu ni vizitis lokan preĝejon, muzeon de la granda slovaka poeto Milan Rufus kaj lian tombon en la vilaĝa tombejo. La plej interesa parto estis vizito al la pumprezerva akvoenergia centralo Čierny Váh, kie ni detale trarigardis ne nur la elektrejon, sed ankaŭ vizitis la supran lagon.
Ĉiuvespere estis aranĝita geografia konkurso, kiu estis kompletigita ankaŭ per ŝercaj demandoj. La etoso estis vere gaja.
Tiom interesa renkontiĝo meritis partoprenon. Mi decidis veni venontjare denove. Pli detalajn informojn vi povas akiri per la paĝo
www.poludnica.esperanto.sk Karel Votoček

Ekskurso al Saksa Svisio

La estraro de Esperanto-Asocio „Saksa Svisio“ invitas vin por la semajnfino de la 1-a kaj 2-a de oktobro 2016 al renkontiĝo, kiu konsistos el la ekskursoj: Rumburk, Dresden, Pirna, Bad Schandau, Děčín, Krásná Lípa-město (kie ni vizitos naciaparkan domon ĉe Bohemia Svisio). Iom post la 16-a horo ni atingos la hotelon Lužan, kie ni babilos, vespermanĝos kaj tranoktos. Dimanĉe la 2-an de oktobro 2016 - post la matenmanĝo ni decidos surloke pri trajnvojaĝo hejmen. Bonvolu aliĝi ĝis la 30-a de majo 2016 ĉe s-ano Norbert Karbe, NoKoSaksio@googlemail.com. Pluajn detalojn pri forveturo de trajnoj transdonos al vi s-ano Karbe.

El la fervoja mondo, Ukrainio:

Inter la ĉeĥa ĉefurbo Prago kaj la ukrainia Kievo denove trafikas rektaj litvagonaroj

Ekde la nova horaro 2015/2016, do ekde la 13-a de decembro 2015, estas renovigita rekta kunligo per longdistanca litvagonaro de Ukrainiaj Fervojoj.

La interkonsento pri tio efektiviĝis jam somere de 2015 dum la Internacia konferenco pri trajnhoraroj, fare de la reprezentantoj de la ĉeĥiaj, slovakiaj kaj ukrainiaj fervojoj. La litvagonaro de Ukrainiaj Fervojoj kun speciala instalaĵo por ŝanĝo de boĝioj en la landlima fervoja stacio Čop forveturas el Prago ĉiun tagon je la 23.09 h, en trajno EŭroNight Bohemia Prago – Humenné. En la dua parto de la vagonkurso prizorgas la trafikon Slovakiaj kaj Ukrainiaj Fervojoj per siaj trajnkunligoj. Al la ukraina Čop la litvagonaro alvenas je la 13.31 horo laŭ la orienteŭropa tempo kaj pluveturas al Lvovo (alveno 22.22 h.) kaj Kievo, kien ĝi alvenas matene je la 7.43 h.

Reen el Kievo la rekta litvagono ekiras 21.11 h laŭ la orienteŭropa tempo, el Lvovo la litvagono forveturas je la 8.40 h, kaj el Čop je la 16.20 h. Al Prago la litvagono alvenas denove per trajno Eŭro Night Bohemia matene je la 7.39 h. Biletkosto komenciĝas de 97 eŭroj por litloko en trilita kupeo. Rekta trajnkunligo inter Prago kaj Kievo funkciis jam en la jaro 2011 tra Pollando en la trajnkurso Prago – Krakovo – Kievo.

Jindřich Tomíšek

Ĉeĥio – Germanio:

Post 70 jaroj denove trafikas la pasaĝertrajnoj al Selb

Vojaĝantoj de Ĉeĥio kaj Germanio denove povas uzi la renovigitan fervojlinion inter la ĉeĥia urbo Aš kaj la bavaria Selb. Lunde, la 7-an de decembro 2015 ĝi traveturis la linion de regula pasaĝertrajno kun reprezentantoj de ĉeĥia kaj bavaria flankoj. Ekde la 13-a de decem-

bro 2015, post la ekvalidigo de la nova trajnhoraro trafikas sur sepkilometra linio po sep trajnparoj tage. Kiel la nova propono sur la linio efikos, montros la estonto. Kargotrafiko sur la linio finiĝis en la jaro 1996, kaj pasaĝertrafiko jam en la jaro 1945.

Por renovigo de sia kvinkilometra parto la germanoj investis ĉirkaŭ 14 milionojn da eŭroj kaj iliaj ĉeĥiaj kolegoj por sia dukilometra linio-sekcio sepdekkvin milionojn da kronoj (ĉirkaŭ 3 milionoj da eŭroj). La germanoj por refunkciigi sian parton krome devis konstrui tri pontojn kaj ripari pasaĝerkajon en la stacio Selb-Plössberg.

Jindřich Tomíšek

Raporto el la urbo Rutshuru

(Afrika Kongo)

Laboro sen raporto ne estas rekonata, tial mi proponis sendi al vi koncizan raporton pri tio, kion ni faras por Esperanto en mia loĝregiono Rutshuru.

Esperanton ni prizorgas diligente en Rutshuru kaj certe antaŭvideblas brila rezulto de niaj streboj estontece. Estante plene mensokupita de nia afero, mi konsideras, ke Esperanto estas kvazaŭ bebo, kies plenkresko dependas iel ankaŭ de mi en mia loĝregiono. Tial mi serioze disvastigas Esperanton en Rutshuru kaj kurson de Esperanto al la loka radio RACOU FM. Bedaŭrinde tio daŭris nur du monatojn pro akraj sekurecaj malordoj: mi fuĝis translimen al Ugando, la plej proksima lando. Reveninte hejmen en januaro 2014, mi daŭrigis mian propagandan laboron por Esperanto nome de Verda Stelano-Klubo

(V.S.K), rezulte de kio mi sukcesis persvadi la estron de la loka radio Alliance FM, s-ron John Koraho pri la neceso ekinstrui Esperanton en sia radio. De tiam, la instrucela dissendado de Esperanto okazas ĉiun mardon vespere kaj tiel ni sukcesas atingi grandan publikon. Ni pagas la elspezitajn minutojn el la kluba monujo, malgraŭ nebonhava.

Same en aprilo mi kaj s-ro Honoré Sebuhoro vizitis s-ron Rev. Pastoro NGANGO MUHIMA petcele enkonduki Esperanton en sia elementa orfa lernejo Njiwa. Lia senhezita aprobo krei ekzoteran E-forcejon el sia lernejo ja certigas nin pri prestiĝa plifortiĝo de la E-movado niaregione en la estontaj jaroj. Por bone instrui la lernantojn, mi decidis apartigi la klasojn laŭ la leg-kaj skribkapabloj de la lernantoj. S-ro Obed NIYONCHUTI helpas al mi ĝardenisti la baznivelajn gelernantojn. La kurso okazas ĉiun merkredon kaj vendredon. Dum radio-emisiado pri Esperanto, mi profitas la okazon inviti du aŭ tri lernantojn por poem-deklami aŭ kanti.

En decembro de la ĵuspasinta jaro 2015, mi kreis novan klubon kiun mi nomis: Junulara Ligo Esperantista de Rutshuru, JLER, kies 9 membroj ankoraŭ lernas Esperanton.

PETO: Ni bezonas lerninstigajn esperantaĵojn, flagon, aparatojn kiel komputilo k.s. Ni tiel kunakvumu tiujn jam semitajn semojn por plena kresko.

NB. La orfa bazlernejo Njiwa situas en la urbeto Kiwanja, en la Teritorio Rutshuru, en la provinco Norda Kivuo oriente en Demokrata Respubliko Kongo.

Retadreso: joelmuhire0@gmail.com
UEA-konto: jmhr-a
PO BOX 08 UG, BunaganaUnagana-Kisoro/Ugando
Samideane via Joel Muhire, el Rutshuru- DR Kongo.

Kristana Esperantista Ligo Internacia

invitas Vin partopreni la 66-an kongreson de KELI. Ĝi okazos en **Bratislava**, la ĉefurbo de Slovakio en la tagoj 16. – 23. 7. 2016. Se vi volas ĝui amikan kristanan medion en la nova kaj sufiĉe komforta teologia fakultato, tuj aliĝu!! Ankaŭ tiuj, kiuj partoprenos la UK-on en Nitra, povas plilongigi sian restadon en Slovakio kaj ekkoni la belan urbon Bratislava. Nitra estas bone atingebla!

La programo estos tre varia. Du diservoj, ĉiutagaj preĝoj, kantado, diversaj prelegoj, koncertoj, 2 duontagaj kaj unu tuttaga ekskursoj.

Pliajn informojn kaj aliĝilojn sendas Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ - 290 01 Poděbrady, e-mail: polnickypavel@seznam.cz

Trista anonco:

El nia asocio denove forpasis tri gemembroj:

Jana Pokorná el Prago * 1. 6. 1946 + 1. 9. 2015

Stanislav Štefan el Kladno *7. 5. 1925 + 19. 11. 2015

Inĝ. Vendulka Dušková, Smiřice * 23. 9. 1947 + 2. 2. 2016

Honoron al iliaj memoroj.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj
Redaktoroj: J. Rýznarová, L. Srbová, J. Kosnar
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941** SKYPE : jary_esperanto
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Bankovní spojení: Poštovní spořitelna, číslo účtu AEH **192150088**, kód banky **0300**
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (nad vaší adresou) jako variabilní symbol!
Roční předplatné časopisu Informilo = 200,-Kč, příspěvek svazu dobrovolný.
La jarabono de Informilo 15 €. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.